

Johann Wolfgang von Goethe,  
Al la luno

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Replenigas ĉion Lun'  
Per nebula bril',  
La anim' solviĝas nun  
Fine en trankvil';

Milde alrigardas ĝi  
De l' ĉielo min,  
Gardas tiu super mi  
Super la destin'.

Ĝojon kaj malĝojon re-  
Sentas mia kor',  
Solas mi intere de  
Ĝojo kaj dolor'.

Kiel de l' rivero flu'  
Amo iĝis for,  
Mi ne ĝojos iam plu,  
Restas la dolor'.

Iam estis mia ŝi,  
La plej bela in'!  
Je turmento mia, mi  
Ne forgesas ĝin!

Fluu kaj susuru tra l'  
Valo pli kaj pli,  
Flustru melodiojn al  
mia kanto vi,

Kiam vintre pro koler'  
Troŝveliĝas vi,  
Aŭ en pomp' de primaver'  
Fluas ĉirkaŭ ĝi.

Ja beatas, kiu de l'  
Monde fermas sin,  
Kun amiko ĝuas ĉe l'  
Brust' tenanta lin.

...

Kio estas ekster sci',  
Ekster homa pens',  
Dum la nokto iras ĝi  
kaŝe tra la mens'.

*Traduko de la Germana poemo "An den Mond" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en la Germanan de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-280-571 (2005-02-06 11:37:45)*